

SCIENCA REVUO, oficiala organo de ISAE
Vol. 38 (1987), n-ro 1 (153)

Eldonanto: Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE)

Ĉefredaktoro: RNDr. Josef Kavka, CSc., Lužná 7, CS-160 00 Praha 6 — Vokovice, Ĉeĥoslovakio

Grafika redaktoro: Bruĉjo Kasini, «Edistudio», c. p. 213, I-56100 Pisa, Italujo

Administranto por la pagipovaj landoj: «Edistudio», pĉk 12230561, Italujo ☎ +39(50)48670

Administranto por la nepagipovaj landoj: Dr. Václav Hník, CSc., Fakulta architektury

ČVUT, Thákurova 7 — CS-166 34 Praha 6 — Dejvice, Ĉeĥoslovakio

Kompostis: «Composit», via Giordano Bruno 8, I-56100 Pisa, Italujo

Enpaĝigis: «Edistudio», c.p. 213, I-56100 Pisa, Italujo

Presis: La Grafica Pisana, Buti (Pisa), Italujo

Reguloj por la aŭtoroj:

1. Verki laŭeble pri sia propra originala esplorado tiel, ke ĝin komprenu eĉ alifakaj sciencistoj;
2. Sendi al la ĉefredaktoro la tekston en du ekzempleroj, klare tajpita sur maldika papero;
3. Maŝinskribi normallitere en la tajp-areo de 165 mm × 250 mm, kun liniado 1 1/2 (7 mm), t.e. kun 40 linioj surpaĝe;
4. Ĉiun vorton neesperantan substreki ondlinie (por la kursiva komposto), dum rektlinia substreko signifas komposton dikliteran;
5. En la teksto noti lokojn, kie troviĝu eventualaj figuroj;
6. Ne forgesi referenc-liston;
7. Aldoni koncizan resumo en sia gepatra lingvo.

Estraro de ISAE:

Prezidanto: Prof. D-ro Carl Stop-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, N- 0258 Oslo 2, Norvegio

Vicprezidantoj: Prof. D-ro Christer O. Kiselman, Thunbergvägen 3, S-752 38 Uppsala, Svedio.

Prof. D-ro h.c. Vasil Peevski, Gogol 9, BG-1504 Sofia, Bulgario.

Ĝenerala sekretario (provizore): S-ro Bruĉjo Kasini, c.p. 213, I-56100 Pisa, Italujo.

Sekretario-kasisto: S-ro Rudi Hauger, ETH-Hönggerberg, CH-8093 Zürich-Honggerberg, Svisio.

Ceteraj estraranoj: D-ro Gerhard Kalckhoff, Schuckerstraße 14/XI, D-8000 München 70, F.R. Germanio.

Prof. D-ro Sin'itirō Kawamura, 424-7 Kinasyō Huzii, Takamatu, 761, Japanio

RNDr. Josef Kavka CSc., Lužná 7, CS-160 00 Praha, Ĉeĥoslovakio

D-ro Marjorie Flint, 3 Longcroft Park, Beverley, N. Humberside, HU 17 7DY, Britio.

D-ro Máximo Valentinuzzi (+).

Inĝeniero Rudolf Haferkorn 90-jara

Jes, la kalendaro ne eraras: la 21-an de aŭgusto 1986 s-ano *Dipl.-Ing. Rudolf Haferkorn* ĝisvivis la 90-an jaron de sia meritoplena vivo. Tiaokaze eĉ ni malpli aĝaj povas por momento halti kaj iom rememori...

Miaj unuaj kontaktoj kun la jubileulo datiĝas komence de 1969. Tiutempe inĝ. *Haferkorn*, kiel direktoro de la Terminologia Centro de ISAE, intencis fondi por unuopaj sciencaj branĉoj fak-terminologiajn komisionojn, kiuj povus kompetente eklabori sur la kampo de la normigado kaj sistemigado de unuopaj nomenklaturetoj. De s-ano *Matulík* mi estis rekomendita, almenaŭ provizore transpreni la estradon de la fondota Ĥemia Fak-Terminologia Komisiono. Tiutempe mi konis la nomon *Haferkorn* nur el faka literaturo kiel grandan aŭtoritaton: membro de la Akademio de Esperanto ekde 1957, direktoro de la Terminologia Centro de ISAE kaj de la Akademia Sekcio pri la Tehnika Vortaro ekde 1958, unu el la verkintoj de "Scienca kaj Teknika Terminaro", direktanto de la tehnikaj kaj naturscienca partoj de "Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto", aŭtoro de "*Technisches Wörterbuch Deutsch-Esperanto*", verkinto de multaj fakaj artikoloj, ekz. en *Scienca Revuo*, longjara elstara laboranto sur la terminologia kampo, k.t.p. Mi iom timis kaj hezitis transpreni la estran funkcion en ĤFTK — labori sub tia direktoro — tiutempe mi estis relative junulo. Nun post vico da jaroj mi rememoras tiun ne tre longan tempon de la laboro sub la gvido de inĝ. *Haferkorn* kiel la plej helan kaj plej idealisman periodon de mia "verda" vivo. Mi bedaŭris, kiam li ekŝiĝis en 1971, sed niaj kontaktoj ne finiĝis.

Kvankam eminentulo, inĝ. *Haferkorn* neniam estis tro oficiala, ni neniam sentis la diferencon en la aĝoj. Li ĉiam estis preta serioze diskuti kaj konsideri la opiniojn eĉ de pli junaj fakuloj. De tempo al tempo, li trovis en siaj priterminologiaj leteroj ankaŭ lokon por pure neterminologiaj notoj. Tiel mi

eksciis iom pri lia gepatra urbo Dresdeno, pri liaj studentaj ekskursoj en la nordan Bohemion, kiel li fariĝis esperantisto, k.t.p. Nun mi bedaŭras, ke tiuj “nefakaj” glosoj ne estis pli abundaj. Ja, kiom malmulte ni ĉiuj scias unu pri la alia en nia hastema moderna erao! Unu el la plej unuaj ekzempleroj de PIV en Ĉeĥoslovakio, estis lia donaco, ĝi multe faciligis al mi la laboron en la menciita ĤFTK, ege helpas al ni ĝis nun.

La pli kompetentaj certe verkos la kompletan bibliografion de inĝ. *Haferkorn*. Tamen mi opinias, ke ĉiuj esperantistoj-fakuloj konsentos kun la ĝenerala aserto, ke nia jubileulo estas precipe unu el niaj plej elstaraj kaj meritplenaj pioniroj en la faklingva normigado kaj sistemigado. Tiu kampo de Esperanto estas ĝis nun iom subtaksata kaj preterlasata. Oni sufiĉe longe diskutas, ĉu Esperanto pli frue bezonas terminarojn aŭ ĉu pli frue fakajn verkojn. Iom tro akademieca disputado. Mi opinias, ke inĝ. *Haferkorn* per sia longjara fervora agado donis pli ol kompreneblan respondon: neniuj evoluanta lingvo nuntempe estas ebla sen normigitaj fakaj terminaroj kaj nomenklaturetoj en unuopaj scienco-branĉoj — duaflanke la terminaroj mem, sen sufiĉe vasta bazo de fakaj verkoj, ne havus sencon.

Okaze de la ronda jubileo ni ĉiuj elkore dankas al inf *Haferkorn* pro liaj meritoj, precipe sur la faka kampo. Ni deziras al li ankoraŭ longan vicon da jaroj en feliĉo kaj firma sano. Sed mi opinias, ke mi povas ankaŭ, en la nomo de ni ĉiuj, deziri al nia jubileulo ion specialan: ke li povu legi ankoraŭ multajn novajn bonajn fakajn verkojn en Esperanto kaj precipe, ke li povu ankaŭ foliumi en la unuaj Esperantaj fak-lingvaj normoj el la kuirejo de la ĵus fondata normiga centro.

Kaj mi persone ankoraŭ esperas, ke mi iam en proksima estonteco vidos inĝenieron *Haferkorn* persone — ja, niaj kontaktoj, kvankam siatempe tre viglaj, tamen ĉiam estis nur skribaj, perleteraj. Lian vizaĝon mi konas nur laŭ fotoĵoj. Oni diras, ke la moderna mondo fariĝis malgranda — tute prave. Sed oni forgesas aldoni, ke tiu mondo ankaŭ konstruis sufiĉe da bariloj, kiuj antaŭe ne estis kaj kiuj nin esperantistojn ege ĝenas.

Ĉion plej bonan al nia kara inĝ. *Rudolf Haferkorn!*

Z. Pluhař

Noto de la ĉefredaktoro

Mi aldoniĝas al la sinceraj bondeziroj de kolego inĝ. Z. Pluhař, menciante, ke en 1980, la prezidanto de Federacia Respubliko Germanio honoris inĝenieron *Haferkorn* per “*Bundesverdienstkreuz*” (Federacia Kruco pro Meritoj), ne sole pro liaj profesiaj meritoj en Telekomunikada Servo de Germana Poŝto, sed ankaŭ pro lia Esperanto-aktivado.

J. Kavka

Sepdek-kvin jaroj de la reakcio inter amino- kaj karbonil-grupoj de *Maillard* (1912)

Sin'itirô Kawamura (Japanujo)*

1. Ĉirkaŭ la jaro 1912

En 1912, ĝuste 75 jarojn antaŭe, franca bioĥemiisto *Maillard* raportis pri la ago de aminoacidoj sur sukeroj, kiu formas melanoidinon. Kvankam li unue konsideris pri la formado de bruna ĝis nigra substanco en humo (t.e. plej supra tavolo de grundo, konsistanta el pli-malpli malkomponiĝintaj vegetaĵoj), li etendis la objekton al mineralaj brulaĵoj kaj brunaj substancoj en manĝaĵoj (1917).

Maillard (1912) mem notis, ke angla sciencisto, *Arthur Robert Ling* (1861-1937) en 1908 publikigis pri formado de koloraj kaj bonodoraj substancoj, kiam oni rostas malton ĉe 120 ĝis 150°C. *Ling* eksciis, ke aminoacidoj kaj sukeroj formiĝintaj en malto reagis; li plu eksperimentis pri la reakcio inter glukozo kaj asparagino.

Unuaj eksperimentoj post *Maillard* okazis en la laboratorioj de *Carl Josef Ludwig Linter* (1855-1926) kaj *Willy Ruckdeschel*, kiuj ambaŭ estis specialistoj pri bierfarado kiel *Ling*.

2. Mallonge pri la vivo de *Maillard*

Kiel mi (1983, 1986) jam raportis laŭ *Achard* (1936) kaj *Strahlmann* (1978), *Louis Camille Maillard* naskiĝis en *Pont-à-Mousson* (48°55' n., 6°03' or.) en Francujo (mi aŭdis de franca bioĥemiisto *Mester* en 1985, ke oni starigos straton *Maillard* en ĉi tiu urbo en 1986 okaze de la 50-a datreveno de lia morto), studis en *Nancy* kaj akiris magistrecon ĉe tiea universitato en 1897 kaj dokto-

d-ro, profesoro pri bioĥemio de nutrado en *Meizen-Kolegio*, *Miyawakityô* 2-4-19, *Takamatu*, 760.